Karl Friedrich Müchler,

# En kel' profunda sidas mi

*tradukita de Joachim Gießner*

En kel' profunda sidas mi
ĉe plenbarel' da vino
kaj antaŭ mi da vino ĝi
de bona origino.[2]

La vinkelist' laŭ oportun',
li ĝojas, se mi drinkas,
Boneghumore fartas mi -
kaj trinkas, trinkas, trinkas.

Soif' turmentas, ĉi demon',
ĝin devas mi forpeli.
Kaj tre efikas la propon'
per vino tion celi.

La mond' ŝajnigas nun, ke ĝi
sin rozkolore ŝminkas:
Boneghumore fartas mi -
kaj trinkas, trinkas, trinkas.

Sed la soifo kreskas nur
post ĉiu freŝa vino,
la konsekvenc' de la natur'
pro trinkofest' sen fino.

Konsolas min, dum sen konsci'
al planko mi nun sinkas:
Neniun suferigis mi,
sed trinkas, trinkas, trinkas.

. . .

Karl Friedrich Müchler,

# Im tiefen Keller sitz ich hier

Im tiefen Keller sitz ich hier
bei einem Fass voll Reben
bin frohen Muts und lasse mir
vom allerbesten geben.

Der Küfer zieht den Heber vor
gehorsam meinem Winke
reicht mir das Glas, ich halt´s empor
und trinke, trinke, trinke.

Mich plagt der Dämon, Durst genannt
doch um ihn zu verscheuchen,
nehm' ich mein Römerglas zur Hand
und lass mir Rheinwein reichen.

Die ganze Welt erscheint mir nun
in rosenroter Schminke,
ich könnte niemand Leides tun
und trinke, trinke, trinke.

Allein mein Durst vermehrt sich nur
bei jedem vollen Becher,
das ist die leidige Natur
der echten Rheinweinzecher;

Doch tröst ich mich, wenn ich zuletzt
vom Faß zu Boden sinke,
Ich habe keine Pflicht verletzt,
ich trinke, trinke, trinke.

. . .

[2]Mi, Manfred Retzlaff, proponas jenan ŝanĝon:
En kel' profunda sidas mi
ĉe plenbarel' da vino.
Ja estas vin' en tiu ĉi
de bona origino.

*Traduko de la Germana poemo "Im tiefen Keller sitz ich hier" de* KARL FRIEDRICH MÜCHLER *(∗1763-09-02 – †1857-01-12) en Esperanton de* JOACHIM GIESSNER *(∗1913-12-23 – †2003-11-25).*

*Arg-944-1897 (2013-12-03 19:31:25)*

*Tiu ĉi traduko troviĝas sub "Weblinks" en la vikipedia paĝo* `http://de.wikipedia.org/wiki/Joachim_GieΓ§ner`. *La kanto estas interalie aŭdebla en* `http://www.youtube.com/watch?v=GvyJZoqzw-8`.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* KARL FRIEDRICH MÜCHLER *(∗1763-09-02 – †1857-01-12).*

*Arg-944-1896 (2013-12-04 16:21:15)*

*La teksto troviĝas en* `http://www.volksliederarchiv.de/text1425.html`. *Pri la verkinto Karl Müchler vidu la retejojn* `http://de.wikipedia.org/wiki/Karl_Friedrich_MΓëchler` *kaj* `http://bsbndb.bsb.lrz-muenchen.de/sfz65927.html`. *Vidu ankaŭ:* `http://www.lieder-archiv.de/im_kuehen_keller_sitz_ich_hier-notenblatt_502280.html`. *Angla-lingva version troviĝas en* `http://www.musicaneo.com/sheetmusicsm-76213_down_deep_within_the_cellar.html`. *Vidu ankaŭ:* `http://www.musicaneo.com/sheetmusicsm-76213_down_deep_within_the_cellar.html`. *La muziknotojn verkis en 1802 la opera kantisto Ludwig Fischer. Pri tiu vidu la vikipediejon* `http://de.wikipedia.org/wiki/Ludwig_Fischer_(OpernsΓhnger)`.